Partenono

Partenono (*helena*, salono de virgulinoj), dora konstruaĵo el la helenisma altklasika periodo, sanktigata al la diino Atena Parthenos (*helena*, virga Atena) kaj ĉefa templo de la akropolo de la poliso Ateno. La peripteron konstruis la konstruiganto Iktino kaj Kalikrato de 447 al 432 a.K. dum la leĝdonado de Periklo. La templon - tute en blanka marmoro - dekoris riĉaj murpentraĵoj de diaĵoj kaj herooj, valormetaloj kaj la fama kultbildo de Atena kiun skulptis Fidio.

Ĝi utilis pretertempe ol kristana preĝejo, moskeo kaj municiejo. 1687 ĝi preskaŭ detruiĝis. La konstruaĵo iĝis parte renovigita ĝis 1840.

La partenono havas longecon de 72 metroj kaj larĝo de 34 metroj (2 448 kvadrataj metroj). Ĝi apartenas al tipo de periptero kiu konsistas el rektangula kerna konstruaĵo (*naos*), ĉiuflanke ĉirkaŭata de dora kolonaro (la hipostilo): 8 kolonoj laŭlarĝe, 15 laŭlonge kaj ene de la kolonaroj, ĉiufoje 4 kolonoj al la interno de la hipostilo, antaŭ la portaloj. Ĝi konsistas tial el sume 50 kolonoj.

La kompleta trabaro estis dekora aŭ figursenca freto. La 160 metrojn longa iona freto, ĉirkaŭ la kerna konstruaĵo, priskribas la panatenajn festivalojn. Reliefo de la orienta flanko priskribas junan knabinon kiu transdonas peplos (antikvan dammantelon) al unu el atenaj oficistoj. La ĉiujaraj panatenaj festivaloj pintis en ĉi tiu transdono.

La certe plej interesa reliefo el la ekstera freto priskribas la batalon de lapito kontraŭ centaŭron. Elorigine la trabaro estis senarabeska ĝis la atena plastikisto Fidio skulptis ĉiujn 92 surpentrajn metopojn (ortangulaj, marmoraj slaboj kiu formigas parte la freton) en 433 a.K..

La partenono estis interne disa; ambaŭ ĉambroj havas altecon de ĉirkaŭ 19 metroj. La plafono estis ambaŭflanke ruĝe-brune panela.

La suda portalo kondukis en sanktejon kiun subtenis kvar kolonoj. De la tiama interna ekipaĵo oni scias nenion certan.

Jam de cent metroj da interspaco al templo oni rekonas la grandan kultbildon de Atena Parthenos, kiun skulptis Fidio inter 447 kaj 438 a.K.. La statuo estis proksimume dek unu metrojn alta. La kerno de la figuro estis el ligno, sed la eksteraĵo estis el valormetaloj, eburo kaj juvelŝtonoj. En la dekstra mano la kultbildo tenis nikeon (niké, diaĵo de venko) el eburo kaj oro. La soklon dekoris reliefo kun la bildigo de la naskiĝo de Pandora. La kompleta verko de Fidio staris meze de malprofunda akvobaseno kiu estis ĉirkaŭata de dek ses kolonoj. La lumo reflektiĝis sur la skulptaĵo tra tia baseno. La stranga brileto kiu heligis la ĉambron emfazis la ĉeestantan diecon. La skulpto estis perdita en la kvara jarcento dum transporto al Konstantinopolo. Ĝia ekzistado estis pruvita pere de bildoj sur vazoj, moneroj kaj vojaĝimpresoj.

Retpaĝo: www.traduki.de
Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Partenono